**N I A   V O Ĉ O**
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz MARTO 1998

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**LICEO TRANSLOKIĜIS**

**Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h, ĉe HEF, RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3°-7** Tel. 91 446 80 79. Jam ne funkcias nia sidejo en Atocha.
La adreso de San Alejandro nur estos por poŝtaj kaj oficialaj aferoj. (La dirección de San Alejandro sólo debe ser usada para el correo y asuntos oficiales).

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

Esperanto grupo en Herouville-Saint-Clair (apud Caen en Normadia regiono de Francio) tradukis al esperanto la turisma regiona paĝo. La daŭrigo de E-versio dependas de la kavanto de visitantoj. Vizitu ĝin!. http://www.normandy-tourism.org
La Komerco kaj Industrio Ĉambro de Colmar (Francio) havas servon en esperanto pri la listo de la neokupitaj profesiaj ejoj: http://www.rmcnet.fr/cci

**EKSTERLANDE**

Konservante la titolon de la malaperinta brajla revuo "Pola Stelo" aperas **songazeto** en Pollando. La vivo de la revuo dependas de la abonantoj, devas atingi minimume 150. Mendojn kolektas: Pola Radio Esperanto Redakcio, 00-977 Varsovio, Poŝtfako 46, Pollando.
La Universitato de Salford (Britio) havas **oficialan esperanto-kurson** por gelernantoj de la unuaj jaroj en Lingvo Lernejo. Ankaŭ funkcias esperanto-kurso en la Universitato de Liverpool.

**HISPANIO**

**Valencia** Esperanto-Grupo inaŭguros novan sidejon la 1-an de marto, en la strato *Avda. Peris y Valero 96, 3a,5. 46006 Valencia. Tel/faks: 96 374 43 99. Retadreso: a-casquero@redestb.es.* Kiel kutime la asocio kunvenaas merkrede je la 19.00 (ne festotagoj). Bedaŭrinde dum la inaŭguro ne okazis festparolon de Gian Carlo Fighiera okaze de malsano

**Castellón.** Dum la Kongreso de Valencia kaj Murcia-Esperanto Federacio oni inaŭguros en Castellón placo kun la nomo Esperanto

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okazigas seminarion en **Vitoria-Gasteiz** kun la titolo "Homaj rajtoj sub premo". Partoprenantoj, sub 30 jaroj, diskutos pri la temo kun fakuloj laŭ subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo de la Konsilo de Eŭropo kiu pagos la 50%-ojn de la vojaĝkosto. Informoj: Lariko Golden. Damjanich u. 1/c. 8, HU-8200 VESZPR'EM (Hungario)

AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato por pli ol 5 ekzemplerojn. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid. NE SENDU ĈEKON.

***KOTIZO POR 1998 KUN DONACO***

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj **ses** jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin **sendi ĉekon po 2.000 pesetojn**, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL. **Se vi pagas rekte al la kasisto en nia kunveno, lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3°-7) vi ricevos kiel donacon esperantan T-ĉemizon***

**1.000 Donkiĥotoj**

HEF/Fundación Esperanto lanĉas kampanjon por kunigi 1.000 mendojn de la genia verko kontraŭ nur 1.000 pesetoj. La disvendo okazos nur se la menditaj volumoj estas minimume 1.000. Mendu ĉe HEF.

**HEF ANGULO**

**Lunde** kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

La tagon 17an de februaro vizitis la CO la niĝeria rifuĝinto Samuel Adebowale, kiu jam de kelkaj monatoj ricevas apogon de esperantistoj en sia azil-peto.

La 19an de februaro venis fotisto de Ediciones El Prado por prepari artikolon por sia enciklopedio "Qué saber". Li prenis fotaĵojn kaj ankaŭ ni korektis la tekston de la artikolo pri esperanto.

La revuo "Gazeta Universitaria" publikigos intervjuon al iu lernanto de nia koresponda kurso.

**57a HEF Kongreso. 1-3a majo. Valladolid.**

En la 3a Kongresa Informilo la Organiza Komitato ofertas du hotelojn (Meliá kaj Felipe IV) (3/4 steloj) kaj aliajn pli malalta kategorio (Enara, Imperial kaj Lima). Vi mem povas rezervi ĉambron telefone aŭ pere de vojaĝagentejo.

Je la 12.00 horo la 3-a de majo esperantaj poetoj legos iliajn poemojn en la kultura aranĝo "Mañanas de la biblioteca" ĉe Domo de Cervantes

Aparte de T-ĉemizon ĉiuj partoprenantoj ricevos alian donacon de Madrida Esperanto-Liceo: la libro "El esperanto en 20 leciones" de V. Inglada, eldonita en 1931.

**ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ**

Radio "Onda Norte", radio-elsendo de la norda kvartalo de Madrido elsendis inform-programon pri esperanto

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

**Memoru ke ni kunvenas lunde je la 18.30h en**
**RODRIGUEZ SAN PEDRO 13·-3°7**

**Kursoj:**
Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
HEF-CO. Koresponda kurso

**Prelego:**
16an de marto je la 19.00 h. "La fenomeno *tamagoĉio*". L. Sanz

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

9-a Kongreso de Valencia kaj Murcio. Okazos en Castellón, 4-5 aprilo. Tel. 964 203238. S-ro Conejero
57-a Hispana Esperanto Kongreso. Valladolid 1-3 majo
50-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. 16-22a majo 1998. Aalborg (Danio) 83-a UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto
84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
San Alejandro 6-4°B.Ext
28005 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal